

VENEZUELA STELO

Organo de Venezuela Esperanto-Asocio, 35-a jaro / N. 82/2 -a semestro 2008



Venezuela Esperanto-Asocio, la sidejo

KELKAJ EROJ PRI LA MONDA LINGVA SITUACIO

Esteban E. Mosonyi

Multaj esperantistoj jam scias, aŭ almenaŭ havas iuspecajn informaĵojn, pri la Internacia Jaro de la Lingvoj, kunordigata de UNESCO. Ĉar Esperanto estas ankaŭ, kaj antaŭ ĉio, unu el la lingvoj ekzistantaj kaj multflanke uzataj, estas nia devo interesiĝi kaj laŭeble kontribui plej rapide, jam je la fino de la jaro. Ĉiukaze ĉi tiu lingvojaro nur estas komenco, pro tio ke la kerna problemo estas tre grava kaj malfacila, antaŭ la evidenta danĝero de la tre ebla kaj ne tiel malrapida dekadenco kaj malapero de multegaj el la proksimume 6000 lingvoj hodiaŭ ĉeestantaj. Tamen la afero aperas tro delikata por paroladi sennuance, kvankam ege abundas fatalismaj voĉoj, kiuj asertadas la pluvivon nure de eta nombro de lingvoj post unu aŭ du jarcentoj. Ni analizu la situation serioze.

Necesas esti realismaj, tio estas ne proklami ideojn tro optimismajn rilate al la rezistemo de multnombraj lingvoj malgrandaj kaj malfortaj. Eĉ tiel la ververo povus esti sufiĉe malproksima de la opinio de la amasmedioj. Ni ne forgesu ke la mondo vivas ekde duonjarcento la erao de refortikiĝo de la diversecoj: ekzemple biologia, socikultura kaj nuntempe lingva diverseco. Ĉio tio konsistigas gravan parton de la mondpolitika agendo, sed ankaŭ de la naciaj agendoj tra la tuta planedo. Impresas kiamaniere rezistas kaj defendiĝas la indiĝenaj kaj aliaj malplimultaj popoloj, multfoje tre sukcesplene. Nia mondskala Esperantomovado estas firma kunhelpanto de iliaj fortostreĉoj. En nia propra lando Venezuelo, la Bolivara Konstitucio de 1999 plene rekonas fundamentajn rajtojn, individuajn kaj precipe kolektivajn, de niaj indiĝenaj popoloj kaj komunumoj, kio enhavas iliajn sociojn, habitatojn, kulturojn kaj ankaŭ lingvojn, kiuj estas konsiderataj oficialaj lingvoj kaj gepatrobienoj de la homaro.

Enhavo

Kelkaj eroj pri la Monda Lingva Situacio, Esteban E. Mosonyi, pp. 1-2a.

Historio de Koktelo, Roberto Cutiño, p.3a.

Monologo de l' Arbo, Leopoldo Silva, (traduko Jorge Mosoyi), pp. 4-6a.

Iun Tagon en la Plaĝo, Ricardo Coutinho, p. 6a.

16-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, Liba Gabalda, p. 7a.

Naciaj Novaĵoj, p. 8a.

La Insulo de Nemo (III), Johano Negrete, pp. 9-12a.

2/ VENEZUELA STELO

VENEZUELA STELO

Apartado postal 47675, Caracas 1041-A
telefonnumero 58-0212.662.9224
www.esperanto-venezuela.org
venesperanto@cantv.net

Redakcia Komisiono: Jorge Mosonyi,
Esteban Mosonyi, Johano Negrete kaj
Nancy Aquino.

Estraranoj:

Prezidanto: Jorge Mosonyi
Vic-Prezidanto: Johano Negrete
Ĝenerala Sekretario: Juan Miranda
Kasistino: Blanca Elizabeth Garzón

Voĉanoj:

Esteban Mosonyi (Interinstituciaj Rilatoj)
Nancy Aquino (Eldonado)
Ricardo Coutinho (Biblioteko kaj Revuo)

Enlandaj Deleĝitoj:

Alfredo Ovalles (Maracay)
Germán Montero (Maracaibo)
Jesús Cedeño (Maturín kaj Ciudad Bolívar)
Alfredo Portillo (Mérida).

Eksterlanda Deleĝito:

Andrés Turrisi (Italio)

Pri la enhavo de niaj artikoloj repondecas
iliaj aŭtoroj.

Manke de indiko de la aŭtoro, responde-
cas la redakcio.

Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte
aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj,
kondiĉe ke oni citu la fonton.

Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj
legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj
kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon
de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la
kunlaborantojn.

Preskaŭ memkompreneble ĝisnune nur malgranda parto de la novaj konstituciaj normoj estas fakte realiĝantaj. La tielnomata Dulingva Interkultura Edukado troviĝas ankoraŭ en preskaŭ komenca stato. La asignado de la teroj kolektivaj, ege necesaj por indiĝenaj komunumoj, tre malfacile iras antaŭen, kaŭze de multoblaj konfliktantaj interesoj. Spite al tiuj handikapoj, venezuelaj indiĝenoj kaj afrodevenantoj daŭrige sinrekonadas reakirante sian etnan orgojlon kaj iniciatemon. Post longa periodo de dolora malfortiĝo, la plejparto de la aborigenaj lingvoj reakiras forton kaj stabilecon, inkluzive skribatan forton kaj ionpostioman amasmedian uzadon. Restas certe lingvoj kvazaŭ malaperantaj, kiel la barea kaj la mapoja, sed aliaj estingiĝantaj kaj jam estingiĝintaj lingvoj, kiel la ajnua, la ĉajma, la gajona, nekredeble reaperas.

Krome, Venezuelo ne estas la unika lando kie okazas tiaj eroj. La popoloj amerindiaj iĝas pli fortaj tra nia tuta kontinento ekde Kanado kaj Alasko ĝis la ekstrema suda konuso, inkluzivante lingvojn kaj kulturojn. Samtiel estiĝas en la ceteraj mondopartoj. Bonege efikus aldoni multajn aliajn spertojn, sed plejbone mi finu per ekzemplo kiu ekfrapis min antaŭ kelkaj tagoj, koncerne Hispanion. Dum la frankisma diktatoreco la regionaj lingvoj hispanaj estis malpermesataj kaj malrapide formortantaj. En nuntempa Hispanio la kataluna lingvo mirakle plifortikiĝas kaj la antaŭe dekadenta eŭska lingvo signife resaniĝas, transirante al novaj spacoj de utiligo. Mi ĵus legis altnivelajn sciencajn artikolojn en la galega. Sed la novaĵo kiu plej surprizis min estas la feniksbirda renaskiĝo de du latinidaj hispanlingvoj dumlonge numure ekzistantaj kiel marĝenunitaj dialektoj uzataj de tre etnombraj gemaljunuloj: tiuj estas la astura kaj aragona lingvoj, redevenantaj denove produktivaj.

Feliĉe estus ke ekfinaĵo la nuna tendenco far etaj kaj malfortaj lingvoj al formorto, kaj la tuta universala lingva kaj perlingva trezoro de la homaro povu senfine pluvi. Esperanto mem disvolviĝus ege pli bone en plurlingva kaj diverskultura venonta mondetoso ol malsupre je la subpremo nedisputebla far la angla, la ĉina kaj eble duondekduo da imperiismaj lingvegoj.

HISTORIO DE KOKTELO

Roberto Cutiño

Guantánamo estas la plej orienta provinco en Kubo, la loko kie unue oni vidas la sunlumon, ĝia nomo en la lingvo de la aborigenoj signifas “lando inter riveroj”.

Ekde la jaro 1995 oni okazigas ĉi tie nacian esperantan renkontiĝon, kiu iom post iom plifortiĝis, prestiĝiĝis kaj hodiaŭ ĝi estas unu el la plej konataj esperantaj aranĝoj en la kuba insulo. Ĉi tiu renkontiĝo okazas ĉiu jare dum la plej proksima semajnofino al la 15a de Decembro kiel omaĝo al D-ro Zamenhof. Jam de du aŭ tri jaroj oni nomas ĝin Nacia Esperanta Metiejo ĉar oni profitas la momenton por montri la uzadon de esperanto en diversaj fakoj.

Pasintdecembre oni oficiale lanĉis esperantan koktelson, kiu estis kreita de guantanamano laŭ ideo de loka esperantisto, en siaj du variantoj: Universala kaj Flago. Ĉi tiuj du variantoj malsimilas nur pro la kvanto da alkoholo kiun ili enhavas, unu estas pli forta kaj la alia estas pli milda. La ĉefa karaktero estas ke ĉi tiu koktelo havas la kolorojn de la esperanta flago: Verda kaj blanka.

En alia momento oni diras kiel pretigi ĉi tiun drinkaĵon, kiu vere taŭgas por esti uzata en esperanta etoso, por tosti je la sano de la esperanta movado kaj memore al la kreinto de la lingvo, D-ro Zamenhof.



Belulino kun la koktelo



La kreinto kaj la ideinto

MONOLOGO DE L'ARBO

Leopoldo Silva

Elhispanigis: Jorge Mosonyi

Mi estas kompatinda kaj mistraktita arbo. Mi estas juna, tamen miaj folioj velkas, miaj branĉoj sekiĝas. Mi revas pri abundo da freŝa sevo, kaj apenaŭ mi nutriĝas kiam pluvoj venas. Ĉi tie mi troviĝas, malgaja kaj forgesita. Mi povintus iĝi heroo arbo, bela samano (1) de la Aragŭaj (2) valoj, naskiĝinta de fluganta semo de la patro de ni ĉiuj: la Samano de Güere (3). Aŭ eble svelta mihao (4) je la piedo de l'Avila (5), fidela atestanto de la kresko de ega kosmopolita urbo. Aŭ eble gracila palmo sin rigardanta en la kristalklaraj akvoj de fludormejo de l'Araŭka (6). Aŭ, kial ne?, fortika manglo lulita de la vento blovanta el Matasiete (7) por halti sur miaj branĉoj en kanalo de La Arestinga (8). Aŭ floranta bukaro (9). Aŭ ora aragvanejo (10). Mi volis esti svelta pino en la andaj montarbranĉoj kaj miaj sonĝoj min translokis al la koro de Gujano por leviĝi al la ĉielo. Mi vidis min stelplena pro la steloj kiujn semis sur mia krono la fulmo de l'Katatumbo (11), kaj en la dunoj de Koro (12) mi povis kreski kun la majesto de harmonia vegetala orgeno kiu disaŭdiĝas sian muzikon sur la ora sablo. Mi povis esti ĉio tio kaj ne estis. Al mi alfalas la plej malbona parto kaj mi naskiĝis missorta. Vi eble diros ke mi estas produkto de ĉi tiuj tempoj. Ke mia epoko estas tiu de asfalto kaj ke mi jam ne utilas nek interesas vin. Mi petas ke vi meditu iomete kaj ne pensu ke mi estas tio al kio vi reduktis min: kompatinda kaj mistraktita arbo. Ĝis tempo relative proksima vi ne povis vivi sen mi:

mi donis la frukton por via nutrado, la materialon por viaj vestoj, la rimedon por vin protekti kontraŭ la krudeco de la vetero. Sur mi vi vojaĝadis laŭlonge de malnovaj polvoplenaj vojoj, en la rapida pirogo sur la turbula rivero, en la leĝera kanoto sulkanta la ondojn de la Kariba maro. Mi portadis vin por malkovri horizontojn kaj koni la teron. Mi produktis fajron por la altmontara malvarmo, kaj sen mi via nokto estis pli nokta. Mi estis kun vi ekde la sojlo de l'mistero, kaj eĉ antaŭ mia apero en la Genezo por esti atestanto de la unua tento, miaj grandaj folioj lulis la naskiĝon de la mondo. Laŭ la tempopaso mi iĝis ĉiam pli utila kaj mi estis simbolo de via abundo. Nun vi vidas min kun malestimo, kaj via disdeĝno malhumanigas vin. Sed prenu en konsideron kion mi diras. Dio volu ke vi tion ne forgesu, kaj ke ĝi restadu en via memoro kiel mi restas por ĉiam en la blazonŝildo de iu provinco de nia patrolando.

Mi estas kompatinda kaj mistraktita arbo. Jam neniu flegas min. Mi nur taŭgas kiel subtenilo por aŭŝoj, kaj por esti alnajlita kiel Kristo. Oni tranĉas min, oni dispecigas min, kaj dume la riveroj sekiĝas, la nebulo forportas siajn blankajn tukojn preter la rokegojn, la erodita tero ŝajnas vivanta vundo, kaj ne plu aŭdiĝas la birdokantado. Ĉio transformiĝas en senesperan solecon, en senombrajn vojojn, en nudajn montojn, kvazaŭ ĉiuj vulkanoj de la mondo estus elverŝintaj sian lafon sur ilin, en rokan senakvan kuŝejon, en malfekundan aridon

kiu etendiĝas preter la nenion. Spektaklo por rigardi terurplenaj kaj plorantaj. Pro tio mi petis al vi mediti. Nun mi petas ke vi pensu pri via propra destino.

Mi estas kompatinda kaj mistraktita arbo; sed, ĉu mi ĉiam estis tia? Eble vi pridubos tion: Iru al la kamparo, al la montoj, al la savano. Demandu ĉiudirekten ĉu oni konas min, kaj vi ricevos milon da respondoj. Kiam la valo pleniĝas je multkoloraj papilioj, ili diros al vi ke mi estis manĝaĵo de iliaj raŭpoj kaj lokis iliajn pupojn en mia sino; la laboremaj abeloj povos oferti al vi la sukron kiun ili suĉas el miaj floroj, kaj la formikoj gvidos vin laŭ la trunko kiu rolas kiel teritorio por ilia iluzia respubliko. Se vi proksimigas viajn okulojn al la tero, la tempo ne sufiĉos al vi por malkovri la tutan magion kiun entenas tiu malgranda sed intensa eklozio de vivo de tiom da malgrandaj estaĵoj loĝantaj en ĝi, kaj –sublima paradokso– tie ankaŭ, je malegala proporcio, paŝtiĝas la grandaj remaĉuloj, krias la senzorgaj primatoj, kaj grimpas la reptilioj en tiu vivmedio kiun al ili mi ofertas. Mi tremblas pro triloj en milionoj da branĉoj, kaj senfina pepado ripetiĝas en milo da nestoj. Mi estas kreinto de la magio de la arbaro, kaj multaj homoj kiaj vi alportis min al ĉiaj vilaĝoj, urbetoj kaj urboj por ke mi revivigu la mirindan arbaron kaj alportu mian enhavon de murmuroj kaj fajfoj, floroj kaj parfumoj. Se vi ne estas indiferenta antaŭ ĉio ĉi, kial vi mistraktas min?

En la tuta fantazio de la mondo mi estas simbolo de beleco, de inspiro, de pura kaj longdaŭra arto. Jam en la surŝtonaj pentraĵoj homoj protektis sin sub mia ombro kaj cervoj nutriĝis el miaj branĉoj. Sur la antikvaj murpentraĵoj de la faraonaj tomboj mi aperas kiel donanto de abundo. Sur la malnovaj aztekaj skulptaĵoj oni simboligas

min kiel dion de vivo. Oni jam parolas pri mi en la Libro de la Vedioj, en la sentencoj de Konfuceo kaj en la skandinava mitologio. En la Olimpo mia ombro estis ripozejo por la ŝvita sinpelado de Tondranta Jupitero. Sen miaj branĉoj ne estus serpento por tenti Evan, nek la kolumbo estus trovinta simbolon taŭgan por porti la bonan novaĵon al la Arko de Noao. Sen mi eble la Filo de Dio ne estus preĝinta en Getsemano kaj sen unu el miaj folioj, hazarde defalinta, Sigfrido daŭre estus restinta nevundebla. Mi estis centro de la pejzaĝo en la renesanca pentrado kaj taŭgis por ke tiuj agrablaj figuroj de l’Rokoko balanciĝu vapore en la vento. Vivaldi prenis min en konsideron en liaj “Kvar sezonoj” kaj antaŭnemulte Respighi kantis al mi en la “Romaj Pinoj”. Iu poeto, granda poeto nia, rememoris la okazon je kiu miaj fruktoj estis tuŝitaj de la Nazaretano kaj utilis kiel mirakla sanigilo por timigita popolo. Se mi utilis ankaŭ por ĉio tio, kial vi mistraktas min?

Lernu el la vento kiu amplene disĵetas la vitalan polenon kiu ekzistigas la arbaron, la ĝangalon, la florplenan ĝardenon. Memoru ke sen poleno ne ekzistas fruktoj kaj sen fruktoj ne ekzistas semo. Krome la insektoj portas de floro al floro la substancon kiu min vivigas kaj la birdoj estas magiaj semantoj de fekundeco je la vasta etendiĝo de la tero, disde la musko kreskanta en la fora Antarkto ĝis tiu maro de tropika vegetaĵaro kiu ĉirkaŭas la terglobon per sia pompe densa verdo.

Sen mi, kompatinda kaj mistraktita arbo, ne ekzistos estonteco por vi. Eble konscie vi disdegnas min kaj neas miajn valorojn. Sed mi sukcesis vin kompreni por alveni al la konkludo ke oni vin ne instruis ami min kaj valorigi miajn specialajn kvalitojn. Mi certas ke oni neniam parolis al vi pri mi.

Do, lasu min demandi: Se vi ne konas min, se mi ne faris al vi malbonon, kial vi mistraktas min?

Originala hispana teksto:

Monólogo del Árbol. Edición especial de la Revista Guardia Nacional.

Aŭtoro: **Leopoldo Silva Salcedo.**

Caracas, 4 de agosto de 1974.

Notoj: La sekvantaj vortoj kaj nomoj ne aperas en PIV:

(1) Samano: Samán. Tropika arbo. *Pithecellobium saman*.

(2) Aragŭa: Aragua. Ŝtato de Venezuelo.

(3) Samano de Güere: Samán de Güere. Fama samano en la ŝtato Aragŭa.

(4) Mihao: Mijao. Tropika arbo. *Anacardium excelsum*.

(5) Avila: Ávila. Monto situanta norde de Karakas.

(6) Araŭka: Arauca. Venezuelo rivero, ŝtato Apure.

(7) Matasiete. Venezuelo monto, ŝtato Nueva Esparta.

(8) La Arestinga. Venezuelo lageto, ŝtato Nueva Esparta.

(9) Aragvanejo: Araguaney. Nacia arbo de Venezuelo. *Tabebuia chrysantha*.

(10) Bukaro: Bucare. Tropika arbo. *Erythrina sp.*

(11) Katatumbo: Catatumbo. Kolombia kaj Venezuelo rivero, ŝtato Zulia.

(12) Koro: Coro. Ĉefurbo de la Venezuelo ŝtato Falcón.

IUN TAGON EN LA PLAĜO

Ricardo Coutinho

Tri junaj virinoj kiuj laboras kune en kosmetikvendejo faris ekskurson al la marbordo por sunbrunigi siajn haŭtojn kaj ĝui bonan etoson.

Kiam la tre belaj virinoj vestitaj per etaj bankostumoj estis sur la sablo tri viroj pasis tre proksime al ili kaj foriris aliflanken.

Margareta: Damne! ne povas esti! Ĉu vi vidis tiun ulon?

Elsa: Kiun el ili?

Margareta: Tiun blondulon.

Mabel: Kio okazas, karulino?

Margareta: Li estas stultulo kiu amindumas min jam de kelka tempo, mi ne volas ke li trovu min.

Elsa: Trakviliĝu, ili revenas! Ni kuŝu rapide kun la vizaĝo en la sablo, ili nur vidos niajn dorsojn kaj ne rekonos vin.

Tuj ili faris tion; kiam la tri viroj pasis denove proksime al la virinoj, la blondulo subite haltis.

La Blondulo: Mi konas vin. Ĉu Margareta?

La vizaĝo de Margareta ruĝiĝis kaj vidis la blondulon. Elsa kaj Mabel vidis sin reciproke kaj ridis, ambaŭ sendube pensis la saman aferon. Ĉu la Blondulo rekonis Margaretan nur per ŝia postaĵo?

Margareta: Saluton, Karlo. Agrabla surprizo vidi vin! Jam de longe mi ne vidis vin!

Dum la tuta tago la tri virinoj kaj la tri viroj travivis kune la tempon je la marbordo. Margareta ne povis eviti tiun okazaĵon, ŝia bela postaĵo malkaŝis ŝin.

16-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO

Liba Gabalda

La ĉi-jara E-Semajno okazis, jam la trian fojon, en la urbo Salou, de la 4-a ĝis la 11-a de oktobro 2008. Partoprenis ĝin 132 gesamideanoj el 8 landoj. La nombro ĉiujare kreskas. Ni loĝis en la hotelo Mediterráneo, kie ankaŭ okazis ĉiuj dumsemajnaj aktivajoj. Agrablaj Interkonaj Vesperoj ebligis konatiĝi kun novaj partoprenantoj kaj babili kun jam konataj esperantistoj. La dimanĉan inaŭguron ĉeestis kaj bonvenigis nin oficialuloj de la urbestraro. Poste ni komune fotiĝis antaŭ la hotelo.

Esperanto-kurson, orientitan al matematiko, gvidis s-ro Aldis Buŝs el Latvio. Krome, li kaj lia edzino konatigis ĉeestantojn kun ilia lando. Inter interesaj prelegoj necesas mencii tiun pri evoluo de la homa specio de s-ro Pere Navarro-Rosinés. Pri Interna Ideo, homaj rajtoj kaj ekologia perspektivo parolis s-ano Wolfgang Gunter. S-ro Gian Carlo Fighiera komparis la unuan Internacian E-kongreson en 1905 kun la 100 jara festado de E-kongresoj en Boulogne-sur-mer, kie ambaŭ aranĝoj okazis. Atenton de la publiko kaptis prelego pri “Verdaj konfliktoj” (el jura vidpunkto) de s-ino Rafaela Urueña Álvarez. S-ano Salvador Aragaj atentigis nin pri la 16a Esperanto-regulo. S-ano Serrano gvidis debaton pri “Kio okazas kun la Interna Ideo?”. Lastan vesperon ni ĉiuj taksis la disvolviĝon de la Semajno. Aperis kelkaj proponoj por plibonigoj, sed ĝenerale ĉiuj estis tre kontentaj kaj ĝojas denove renkontiĝi post unu jaro en Katalunio.



La premio de Ada Sikorska-Fighiera pro poresperanta laboro estis aljuĝita al s-ro Baldur Ragnarsson el Islando. La ĉef-organizantoj de la Semajno s-roj Serrano, Aragaj kaj Torné atingis ĉe la urbestraro, ke oni metu Esperanto-tabulon pri la 16-a Semajno en la strato Esperanto. Ni ĉiuj ĉeestis tiun solenan agon kun la ĉesto de la urbestro mem. Ankaŭ al li estis donacita la sama, sed malgranda tabulo. Post la solenaj paroladoj ni kantis la Esperanto-himnon. Pri nia aranĝo interesiĝis ankaŭ ĵurnalistoj. La televido, en regionaj novaĵoj, elsendis intervjuon kaj en lokaj ĵurnaloj aperis informoj pri la aranĝo.

La vesperaj programoj konsistis el prezentado de du filmoj kun subtekstoj kaj opero “La Barbiro de Sevilo”. Ĉiam tre gaja kaj emociiga estas la ĵaŭda folkloro vespero kaj gustumado de la fama “cremat”, servata en specialaj ceramikaj ujetoj. Ĉi-foje muzikis kaj kantis la ensemblo “Penjats de l’ham”, kio en traduko signifas pendigitaj je fiŝ-hoko.

Dum la aranĝo ni vizitis du muzeojn. La unua temis pri la fervojo en Vilanova i la Geltrú. Impresis vico da vapor-lokomotivoj kaj la rapida trajno Talgo. Ni povis kompari la internon de ambaŭ specoj da vagonaroj. La alia muzeo pri vino estas en Vilafranca del Penedès. Tie ni libervole promenis kaj observis surmurajn bildojn kun demandoj kaj spektis projekciadon pri vinkulturado. Tuj apud nia hotelo troviĝas kampara domaro kiun ni vizitis. Tiamaniere ni povis vidi kiamaniere la homoj vivis en la pasinteco.

Dum la tuttaga ekskurso ni vizitis Barcelonon. De Tibidabo-amuzparko ni havis belan panoramon al la tuta urbo. Post preĝeja vizito kaj tagmanĝo ni traveturis la urbon kaj piediris al Zamenhof-strato. Ĉar pluvis ni pluveturis ĝis granda aĉet-centro ĉe la haveno. Tie ni havis iom da libera tempo. Iuj malgraŭ la pluvo promenis ĉe la “Rambla” (konata promenejo) kaj kelkaj vizitis la placon kie staras monumento pri Kolumbo.

La tuta semajno estis agrabla kaj sukcesa. Necesas danki al la organizantoj pro varia kaj interesa programo dum la Internacia Esperanto-Semajno.

Naciaj Novaĵoj

Vizito de geedzoj Gabalda kaj Alfredo Portillo.

En la monato aŭgusto vizitis Venezuelan Esperanto-Asocion Liba kaj Floreal Gabalda. Ambaŭ estis fervoraj asocioj dum la 1980a jardeko, sed ili devis translokiĝi al Francio, kaj ekde tiam ili partoprenas en eŭropaj eventoj. Ilia ĉeesto estis tre agrabla por ni, kaj per ilia diligenteo oni denove havas la Kronikon de Venezuela Esperanto, bela historio de nia nacia movado farita de Liba kaj Floreal Gabalda kaj permane skribita. Ili donacis ankaŭ tureton de Eiffel kaj belan bildkalendaron. Ilia vizito koincidis hazarde kun la vizito de Alfredo Portillo, esperantisto kiu loĝas en la urbo Mérida (Venezuelo), jam de longe asocio kaj amiko. Je la sama monato vizitis nin Manuel Ortega (el Anzoátegui, Venezuelo).



Jen la foto staras:

Johano Negrete, Liba Gabalda, Floreal Gabalda, kaj sidas Alfredo Portillo

Ordinara Asembleo

La Jara Ordinara Asembleo de VEA okazis je la 15a de novembro 2008.

Info Esperanto.

La samideano Alfredo Portillo kreis ĉijare unufoliajn retajn informilojn; per ĝi oni povas scii pri la movado en la hispana. Gratulojn al nia amiko. Oni povas elŝuti la informilon pere de oficiala retejo de Portugala Asocio de Esperanto:

<http://www.esperantopt.com/dosieroj.htm>

Malfermiĝis du kursoj en la Centra Universitato de Venezuelo

La profesoro Johano Negrete malfermis du kursojn en la lernejo pri Filozofio en la Fakultato pri Humanismaj Studoj kaj Edukado: la unua estas elementa kurso kaj la alia estas progresiga. Ambaŭ enhavas instruadon pri esperanta kulturo.

Nova retejo por Venezuela Esperanto-Asocio

Kelkaj monatoj post la fermo de la antaŭa retejo, kiun Victor Sirvent pruntedonis al VEA dum multaj jaroj: www.esperanto-ve.org, Martin Schäffer kaj la Amerika Komisiono donacis al ni la retejon www.esperanto-venezuela.org. Fakte, ekzistis du projektoj tre bonaj por la retejo: la projekto de Rubén Alfonsin kaj tiu de Martin Schäffer. Post kelka interŝanĝo de opinioj la estraro elektis la projekton de Schäffer.

LA INSULO DE NEMO (III)

Johano Negrete

Vesperiĝas dum septembro en la insulo de niaj protagonistoj, kaj kiam la luno marŝis ankoraŭ pala kaj malforta ĝis la mezo de la ĉiela volbo por establi sian regadon super la ombro-regno, Nemo kaj Munja eniris la gastejon por vespermanĝi kaj iris rekte al la salono salutante la malmultajn gastojn, kiuj same alvenis por la sama manĝo-horo.

La gastejo estis modesta, ĝi konsistis je trietaĝa domo kun dudeko da kabanoj en la ĉirkaŭaĵo. Ne estis la tempo de abunda vizito de turistoj, kaj niaj geamantoj ĝuis tie kelkajn tagojn de soleco kaj trankvilo. Ili venis de tre distaj landoj por renkontiĝi en tiu kariba kaj eta insulo. Blankaj plaĝoj, suno kaj agrabla temperaturo kune kun amo estis preskaŭ ĉio, kion ili sopiris jam delonge.

Ĉe la fundo de la manĝejo troviĝis tiu libera tableto apud fenestro, de kie ili ŝatis la vidaĵon de la maro, kaj plurfoje ambaŭ ĝuis ekstaze kun manoj interkroĉitaj la finan momenton de la sunsubiro, kiam radiantaj orkoloroj invadis la teron. Ĉe preferinda loketo de la antaŭaj tagoj nun ili eksidis silente kaj etendis la rigardon al la horizonto.

Baldaŭ alvenis la kelnerino kaj atente ricevis la mendon pri trinkaĵoj, kaj sekve lasante la manĝokarton ŝi foriris.

-Kara, vi promesis rakonti ion interesan. Diru al mi, pri kiu ĉenero vi parolis. Kio estas la "unua ĉenero"? -demandis Munja, finante la paŭzon.

-Mi promesas poste rakonti pri la unua ĉenero. Mi ĝojas ĉi-momente kiam mi kontemplas viajn belajn okulojn kun la alveno de la unuaj ombroj. Ili ŝajnas tute katinaj, karulino.

-Tiu ĉi momento estas bone por ĉio. Mi ne

povas koncentriĝi pri alia afero ol tiu, kiun vi nun ŝuldas al mi rakonti. Kara, vi ne rajtas lasi min en tia stato de pikanta scivolemo kaj nekompreno. Ek, diru! karulo mia. Se ne, mi eble ploros kaj vi kulpos.

Kaj dirante tion, Munja flustris malfortan susuron akompanante ĝin per petegaj okuloj invitantaj al la rakonto, dum per sia dolĉa mano, ankoraŭ kun odoro de koralmaro, karesis la malhelan brakvilon de Nemo. Li ne povis rezisti la fortan scivolemon de Munja nek la instigantan ataketon de la virino sur lia volo prokrasti la temon. Li rigardis ŝian blankan manon, la manon kiu avancis laŭ lia brako kaj karesis. Ŝi havis mildajn kaj se ne grandajn almenaŭ belformitajn manojn kun aranĝitaj ungoj, ĉar li ŝatis ekde la unua momento tiujn manojn, kaj eĉ konfesis al ŝi, ke inter la virinaj korpartoj, kiujn li trovis plej admirindajn, estis ankaŭ la manoj, se ili estas longaj, elegantaj, vibrantaj kaj tute pretaj por karesoj.

Revenis la kelnerino, servis duonbotelon da blanka vino kaj pretigis du trinkaĵojn. La paro gesttostis kaj gustumis la vinon kun avida reciproka rigardo. Per vinpokalo enmane, kvazaŭ li bezonis azpergi la agrablan babiladon, Nemo rompis la paŭzon, kaj kompleze instigis al la temo.

-Kara, mi kredas, ke mi amis vin jam de longtempe. De kiam mi estis infano.

-Kiel tio kredeblas? Ho, Nemo mia, vi frenezas. Al mia verdokula frenezulo nun unu longan kison por sanigi lin. -Kaj ŝi plenumis sian sanigan oferton prenante lian buŝon delikate, sed kovrante ĝin per funda lingvokiso.

En lia menso, jam perpleksita pro la ekscitiĝo de la momento, Nemo subkonscie serĉis en la memoro de sia infanaĵo; de kiam li sopiris pri blondulinoj en sia ankoraŭ

naŭjara aĝo. Li trovis, ke ekde tiu tempo li ja adoris blondulinojn. Povus esti, ke kliŝo pri kinaj usonaj stelulinoj influis tiun guston, ĉar enlande malabundis tiuj virinoj, sed tiu ĉi estis sendube la revo de la tiama infano. Kun tiu penso li reprenis la parolon.

-Iusence jes, mi frenezas, kara. Nu, mi rakontos al vi. Bonvolu esti pacienca kaj aŭskulti la tutan rakonton, kiu montros al vi kial veras, ke mi ne bone konis tiun ulon nomitan Don Nemo Tenorjo, nek lernis de lia instruado al ĉiuj viroj de la mondo. Atentu!

Kiam mi estis naŭjara, Munja, mi jam sopiris al blondulino. Eble al virino sama kiel vi. Jes, tiu infano, kiu mi estis, jam de tiam sopiris, ĉu li revis sur la lito aŭ ĉu li songis, li kutimis vidi nubon de blondaj haroj kiel oro sur li mem. Imagu nun tiun infanon, kaj kiel li mire memoris tre impresan filmon, kiun li marmeze spektis sur la ferdeko de itala transocea ŝipo nomita Pablo Toscanelli. Tiam li estis naŭjara kaj revenis de la amerika kontinento al sia lando. La filmheroino ĉe la ekrano estis usona blondulino, kaj kun tia gracio kaj anĝela vizaĝo, ke de tiam Nemo, sekrete, sed konscie, amis blondulinojn. Eĉ subite li volis edziĝi al ajna blondulino kiam li aĝos dek.

Rutine li ludis kaj faris sian normalajn lerneajn taskojn, sed dumnokte je la dormohoro, li komencis revii ĉe la lito pri imaga blondulino. Aperis la anĝela figuro de blondulino. Tiam li karesis ŝin kaj prenis sur la brakojn ŝian korpon portante ŝin al la lito por ŝin protekti de iu malsaneto. Ne estis ankoraŭ la tempo de seksa instinkto kaj nur la idealisma protektado funkciis en la revo de tiu infano.

Iufoje, iomete pli aĝa, sed ankoraŭ infano, Nemo intencis sekvi tra la stratoj iun ajn nekonatan blondulinon, kiu aperis en la urbeto aŭ kiun li vidis en la plaĝo kun banvesto. Tiutempe inter tabuletoj kaj kajeroj

sekrete li adoris idealan virinon, kiu nepre devus esti blondulino. Sed tamen la idealo ne akiris ankoraŭ konkretiĝon en la realo per difinita vizaĝo, kvankam tiu infano ne povis pensi pri alia speco de virino. Escepte de blondulino ne ekzistis por li, ekzemple, brunulino, nek ruĝharulino, nek negrulino nek azianino, kiu povus eniri en la plenkreskulan vivon de lia fantazio.

Oni povas pensi, ke tiu bildo baldaŭ malaperos inter la multaj fantaziaĵoj de infano, kiu devas kaj lerni kaj okupiĝi pri konstantaj novaĵoj en la tenera aĝo de sia mezlernejo. Ĉu simplaj infanaĵoj? Tamen, li ŝajnis obstina, kaj tia deziro daŭris longe ĝis kiam li frue adoleskis en la tria kurso de sia oficiala liceo, ĉar tiam okazis, ho, junula miraklo! tiu transformiĝo, la plej granda emocio, kiu inundis ĉiujn liajn sentojn, transformis lian menson en fantastan pejzaĝon, tio estas, venis la unua enamiĝo kun intensa forto, kiel floro antaŭprintempa, kiu aromigis la etan vivon de la dekdujarulo, ankoraŭ surportanta mallongan pantalonon.

Efektive, Amoro kaptis lin tre frue, tre naive, subite kaj sendefende. Atinginte Nemo dek tri jarojn, la licea knabino, kiu nomiĝis Njeves, ĵus dekvinis. Ŝi estis tre studema kaj inteligenta, kvankam iom timema kaj malmulte komunikema. Lernantino de la sama liceo, tamen ŝi antaŭis al la adoleskanto je du gradoj laŭkurse, ĉar dujara diferenco inter ili, kio jam estis sufiĉa apartiga trajto inter liceaj gelernantoj, ankaŭ signifis diferencon de du niveloj en la lernejo.

Li konatiĝis kun Njeves en koridoroj kaj ĝardenoj de la liceo, dum libertempo inter klaso kaj klaso kaj en la normala irado surstrate. Komence per timemaj alproksimaĵoj tipaj ĉe geknaboj. Lakta blankulino kun loza longhararo, kiu elĵetis orkolorajn radiojn, Njeves ne estis, precipe kaŭze de sia timemo, gracia aŭ pimpa knabino inter siaj koleginoj, sed verdire sufiĉe beleta pro sia haŭtkoloro

11/ VENEZUELA STELO

kaj brila hararo, kiu, kiel ormonero, distingebles de malproksime. Krome ŝi kondutis sufiĉe serioze, dolĉe kaj response por aliri intereson inter siaj kunuloj.

Al la knabo ŝajnis ŝi la plej bela knabino de la mondo, kio estis nur bobeloj de lia revo. Li sopiris al Njeves dum du longaj jaroj kaj iom post iom ŝi fine akceptis lin kiel koramikon, ĉar li ankaŭ estis belaspekta kaj persistema. Kompreneble, la rilato fluis nedifine laŭ la limoj kaj kutimoj tiulokaj. Kelkfoje ili promenadis kiel du enamiĝintoj, diskrete, sen seksa pasio, kaj aliffoje iomete konkurencis per pikantaj dialogoj, kaj nur pro tio li fieris kaj ĝojis. Kun la tempopaso ŝi dubis, ĉar ŝiaj du amikinoj ne konsideris sufiĉe aĝa nek matura tiun knabon por fianĉiĝo. Do influante mian karan knabinon, diŝirante mian koron, ĉar tiu koro estis prizonulo de la dolĉa knabino, mi trapasis periodon de malĝojo. Kaŭze ke ŝi estis en supera kurso, baldaŭ ŝi devis fini la liceon kaj eniri la universitaton, laŭ sia bona studemo. Konsekvence la rilato malfortiĝis, kaj la lokaj antaŭjuĝoj funkciis. Tiumaniere venis la disiĝo, kaj kiam ŝi kompletigis la sesan kurson, ŝiaj gepatroj sendis ŝin preskaŭ al fora lando, tio estas, al tre dista provinco, kie ŝi komencos la universitaton. Tie — li imagis — ŝi devos trovi multon da novaj universitataj amikoj. Adiaŭ al mia kara kaj kaj blonda iluzio!

Dume, Nemo daŭrigis en la liceo du jarojn pli. Aliaj knabinoj aperis ĉe lia horizonto sen la sama graveco. Pasis tri jaroj kaj fine Njeves kaj Nemo forgesis unu la alian. Sendube, li neniam forgesis ŝin entute. Ĉar ŝi alportis la sonorilon de la unua enamiĝo, la intensan kaj ruĝan iluzion, la vekigon al la virina mondo, reflektitan en tiu pejzaĝo de knabino kun ora kaskado sur la ŝultrojn kaj dolĉa sinteno. Neniam li forgesis ŝin, neniam! Eĉ post kiam li, jam deksepjara, elmigris celante novajn aventurojn alilande.

— La unua enamiĝo ĉiam havas ĉarmon,

kara. — subite interrompis Munja, kiu atente sekvis la rakonteton — Tamen vi multe romantikas en via prezentado, kaj tiel stranga mi sentas vin, kiam vi parolas pri vi mem en tria persono, tio estas, vi uzas “li” antaŭ “vi”. Ĉu vi konscias, ke vi estas tiu sama knabo unuafoje trafita de Amoro?

— Mi estis, Munja, sed mi jam ne estas, ĉar ne havas hodiaŭ la saman personecon. Pro tio mi diras, ke eble mi ne estas tiu knabo. Ne nur ŝanĝiĝas la ĉeloj de la korpo ĉiun sep jarojn, ankoraŭ multe pli ŝanĝiĝas la karaktero, la personeco, aŭ se vi volas, la animo de niaj korpoj.

— Certe, kara, ŝanĝiĝas la persono, kvankam vi ne intencas kredi al mi, ke vi jam ne rekonas tiun knabon, sentimentalulon... Ĉu vere? Ne, ne povas esti. Laŭ mia kono pri vi, kaj pri viaj leteroj vi aspektas la sama sentimentalulo aŭ romantikulo de via unua enamiĝo.

— Ĉu tion vi pensas pri mi?

— Jes, kaj krome, ke vi estas sentema viro, kiu tamen klopodas ŝajni cinikulo. Ne insistu, kara, ĉar vi ne sukcesus transformiĝi en akran aŭ duran ulon. Ulaĉon? La rakonteto montras ankaŭ, ke vi ne povas rezisti blondan vizaĝon. Hej! Viaj sensoj kaj koro estas markitaj, kaj pro tio mi perdis propran meriton antaŭ vi. Se ne, respondu tuj: ĉu vi enamiĝis al mi kiel Munja aŭ kiel blondulino?

— Tuj, tuj, ĉu mi enamiĝis? Ne kara, vi scias, tio estis procezo.

— Ne ŝanĝu la demandon. Tuj, tuj respondu! Ĉu pro mi aŭ pro blondulino?... aŭ povas esti laste pro Njeves? Ĉu mi similas al Njeves?

— Fakte ne, karulino. Trankviliĝu! Haltigu tiom da demandoj! Ĉu vi ĵaluzas? Kompreneble ne, ĉar vi ne ŝatas absurdajn. Vi diferencas, vi estas unika. Tio estas nedubebla kaj mi amas vin pro tio. Tamen mi akceptas, ke mia temo estas konfuza, kaj ke mi ne prezentas ĝin trafte.

Vidu, mi neniam kredis mia destino enamiĝi je blondulino. Sed tio okazis frue kaj forte,

kaj daŭras, kaj nun vi venas al mia vivo kun viaj fascina kaskado el oro kaj ĉielaj okuloj. Ĉu Amoro pafas min ĉiam per la samaj sagoj? Bela bildo kaj malbona infano tiu Amoro. Pro tio nuntempe mi karesas la ideon, ke iu singulara nerezistebla impulso pelas min okulumi iun ajn blondulinon, kiu vivas surtere. Do, ĉu destino, fortune, fatalo? Kiel vi nomus tion? Tio estas la kerno de mia rakonto. Vi insistis, ke mi parolu pri la unua ĉenero, kaj mi komencis dirante, ke mi amis vin ekde mia infaneco, pro kio vi primoketis min. Iamaniere vi estas la bela daŭrigado de mia unua enamiĝo, de tiu kazo, kiun mi ne povis solvi en mia juneco, ĉar ĝi rezultis nekompleta, frustrita aŭ desapontita. Do, kial ne vidi vin kiel la duan parton de tiu amo? Jen la signifo de la unua ĉenero. Vi estas parto de la ĉeno, kara, la plej granda, kaj Njeves la unua ĉenero, kiu gravas, ĉar ĝi fiksas la sekvantan vojon. Ĉu tio havas sencon por vi?

— Nun mi sciigas vin, ke vi ne faru tiom da demandoj kaj tiajn, kiajn mi ne povas respondi, karulo. Vi perpleksigas min. Kaj aldone estas klare, ke vi kontraŭdiras vin, kiam vi konfesas, ke vi ne sentas esti la sama junulo de liceo, kaj poste akceptas, ke iu supernatura forto pelas vin al serĉado de blondulino. Ĉu ne, karulo? — subite ŝi ridetis, kiam ŝi trafis tiun truon en la rezonado de Nemo, kaj pli aserta ŝi reprenis la parolon.

Mi estas skeptika kompare kun vi, kiam vi verŝajne kredas je “destino” aŭ “fatalo” —ŝi emfazis tiujn du vortojn— Tenebraj vortoj! Uf! Mi tremblis. Mi supozas, ke unu aŭ alia nomo dependas de kiel kaj kiom agrabla estas la amrilato. Ne deziras mi diskuti pri filozofio aŭ dia volo. Ni virinoj kredas precipe je la naturo, kaj laŭnature ni scias kiam ni amas, kaj kiun. Nia sesa senso, kara, estas nia metodo, sen okupiĝi pri destino aŭ fatalo. Brr! Ankoraŭ mi tremblas uzante tiujn vortojn. La vivo de la naturo estas tie ĉi, kaj

mi ne kredas je aliaj sortoj escepte de tio, kion oni konstruas per oniaj manoj. Do, malfacile estas pensi, ke mi estas la “lasta ĉenero” aŭ la “dua”. Ĉu vi memoras tiun version de kanto, kiu ekdiras “La padon faras la irado”? Tion mi kredas, sen multe da pensado. — kaj dirante tion, ŝi alproksimiĝis al Nemo por kapti lian buŝon kaj reteni ĝin en febra longa kiso.

La kelnerino revenis por demandi pri manĝomendo, sed trovis tian scenon kaj ridetis, ĉar supozis, ke post longa parolado kaj kizado ankoraŭ neniu mendo eblas kaj retiriĝis prudente ĝis oportuna okazo.

Niaj geamantoj rimarkis la foriron de la kelnerino kaj ambaŭ ridetis kun komplika rigardo. Levante la pokalojn ili denove gesttostis kaj gustumis la blankan vinon. Sekve li karesis la longan, malligitan hararon de Munja, kaj iliaj vizaĝoj kuniĝis en kvieta kaj daŭra kiso fermokula, kvazaŭ la lipoj penus elĉerpi la tutan sukeron de tiu momento de feliĉo.

Sekvis ravo de vizaĝoj. Nun estis iliaj okuloj, kiuj sin kisis reciproke kvazaŭ duelo de esploraj rigardoj persitanta en proksimeco. Ilia spirado iĝis pli intensa. Tiu paŭzo minacis la celitan vespermanĝon, ĉar la tuta mondo nun ekŝajnis retiriĝi kaj ju pli la miro de siaj animoj kreskis, despli la emocio altiĝis. La kapoj kliniĝis por rekisi. La interna muziko de la kortiktakoj invadis la intiman etoson. Nemo rememoris kaj recitis al sia amata du versojn de la araba poeto:

“ Mi kaj ŝi, la pokal’, la vin’, kaj la mallum’
ŝajnis tero kaj pluv’, oro, perlo kaj gagat’.”

Jam la nokto mastris tiun ekstazon de paro kaj baldaŭ la ombroj entute kovros la venontan duelon de geamantoj, kies vera luno, aŭ suno de noktomezo, estos nur la brilo de iliaj nudaj korpoj, disjetita de amora flamo, en perdita kabano apud kariba strando de la insulo de Nemo.

(Daŭrigota)